

# Aziaj esperantistoj en Israelo

La 7-a Azia Kongreso de Esperanto okazis de la 18-a ĝis la 22-a de aprilo 2013 en Jerusalemo, Israelo.

**A**ldone al la kleriga kaj arta programoj la partoprenantoj povis ĉeesti 4-tagan antaŭ-kongreson en la norda parto de Israelo, duontagajn ekskursojn en Jerusalemo kaj apude, kaj 5-tagan postkongreson en la suda parto. Tiu turisma programo reflektis ankaŭ la kongresan temon: “Ekologio de paco – kunvivado de homo, medio kaj naturo”.

La bezono informi Esperantujon spronis rapidan konstruon de nova retejo kun aparta paĝo por la kongreso <http://www.esperanto.org.il/ak2013>.

Aliĝis 160 personoj el 26 landoj, la plej grandaj grupoj venis el Israelo (62), Japanio (20) kaj Ĉinio (14). La ĉina delegacio estis gvidata de altranga kongresano – vicministro en la ĉina registaro. La kongresa programo estis tri-parta: en la mateno ĝis la posttagmezo – ekskursoj en kaj apud Jerusalemo, ĝis la vespermanĝo – kleriga programo (prelegoj) kaj post la vespermanĝo – arta kaj distra aranĝo. En la inaŭguro salutis la vicurbestro pri kulturo kaj arto, estis legita saluto de la prezidanto de UEA kaj parolis

la eliranta kaj novelektita prezidantoj de KAEM. La kongresa ekskurso programo konsistis el kvar ekskursoj en Jerusalemo: la okcidenta apudurba regiono – la holokaŭsta muzeo Yad Vashem kaj la araba vilaĝo Abu Goŝ, la orienta apudurba regiono – la Oliva Monto kaj natura promeno ĉe la rivero Kelt; la antikva Jerusalemo – la Templo Monto, la Tombo preĝejo kaj la Lamenta Muro, kaj la moderna Jerusalemo – Kneset (parlamento) kaj la Israela Muzeo. En la kleriga programo estis prelegoj i.a. pri Indonezio, infanedukado en Vjetnamio, ĉina opero, la cunamo-katastrofo en Japanio. Okazis debato pri la paco

en la Mezoriento, gvidata de Renato Corsetti, kaj prelegoj pri moderna pentrado en Israelo. KAEM elektis novan prezidanton Ruixiang Wang el Ĉinio kaj la venontan landon por la 8-a Azia Kongreso en 2016: Ĉinion. En la arta programo ĉefrolis la mirindaj Kajto kaj Jomo, kiuj kantigis kaj dancigis la kongresanojn de ĉiuj aĝoj. Aperis israelaj danc-grupoj, orienta (ventra) danco kaj eŭritmia dancado. Antaŭ la kongreso 30 personoj partoprenis la 4-tagan ekskurson al Jafo, Hajfa, Akko, Nazareto kaj la Lago de Galileo. Post la kongreso 30 kongresanoj ĝuis 5-tagan ekskurson al Jeriko, la Morta Maro, Masada, Eilat, la Ruĝa maro kaj al Petra, la nabatea antikva urbo en Jordanio.

**Amri Wandel**



La vendreda ekskurso al Yad Vashem.

Foto: la aŭtoro